

Usona Esperantisto № 2020:3 (maj-jun)

Anoncoj

UEA petas subtenon por retaj projektoj; Plibonigu vian parolkapablon, senpage!

Kiaj ŝanĝoj! Kia mondo!

de la prezidanto • Filipino DORCAS

Ni, la "samideanoj" de la mondo, spertas novajn defiojn ĉe ĉiu paŝo de la vivo.

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Doroteo dancis

leterkesto • Keneĉjo GOLDBERGO

Omaĝe al Doroteo HOLLAND, okaze de ŝia 100-a naskiĝdatreveno.

NASK en pandemia jaro

loke • Lee MILLER

Neniu imagis, en la komenco de 2020, kia estos la sekva periodo, kiaj estos la ŝanĝoj. Neniu.

La akcento estu sur la lasta silabo!

lingvaj rajtoj • Norman BERDICHEVSKY

Imagu, ke vi spektas lerte produktitan kulturfilmon pri Usono, en kiu eminenta gvidanto misprononcas la nomojn de gravaj kaj mondfamaj historiaj figuroj.

Kion fari pri propraj nomoj?

traduku! • Hoss FIROOZANIA, Lee MILLER

Ĉu ni "esperantigu" ilin por internacia legantaro, aŭ ĉu ni konservu ilin senŝanĝe? (Tradukoj el *Mary Poppins*; nova defio el *Little Brother*)

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La naŭa en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

Ŝi tion ja meritas!


el la arĥivo

Dum la Landa Kongreso de 1984, Dorothy HOLLAND fariĝis Honora Membro de ELNA.

Mankato

senintenca esperantaĵo • Brandon SOWERS

Mankato, "n" mankas al vi.



Anoncoj

UEA petas subtenon por retaj projektoj

UEA fariĝis la oficiala aŭspicianto de la reta fonduso **Instigo-Liberapay**

<https://eo.liberapay.com>

[/instigo](https://eo.liberapay.com/instigo), kiu arigas en si

plurajn gravajn projektojn:

inkluzive de Eventa Servo, Komputeko, kaj tradukado de Telegram kaj WordPress en Esperanton. La fonduson starigis belgaj esperantistoj por subteni Esperanto-agadojn. Nun UEA alvokas la tutmondan komunumon subteni la fonduson. Inter la strategiaj agadoj por Esperanto estas:

- **Eventa Servo** <https://eventaservo.org>: senpaga servo de UEA kaj TEJO, kiu fariĝis unu el la plej popularaj retejoj en Esperantujo. Via subteno helpas daŭre funkciigi kaj plibonigi la retejon. Subtenu ĝin ankaŭ per aldono de viaj eventoj!
- **Komputeko** <https://komputeko.net>: prikomputila terminokolekto, gvidata de E@I.
- Tradukado de **Telegram** <https://telegramo.org> kaj **WordPress** <https://wordpress.com> al Esperanto. Gravas instigi al ĉiam aktuala traduko de tiuj kaj aliaj platformoj, kiuj utilas al esperantistoj kaj montras la uzatecon de Esperanto.

La fonduso celas akiri 50 eŭrojn semajne, kaj por kuraĝigi la komunumon UEA faris unuan donacon de



600 eŭroj por la jaro 2020 kiel bazan kontribuon. Bonvolu **legi kiel eblas al vi kontribui**

<https://eo.liberapay.com/instigo>.

Plibonigu vian parolkapablon, senpage!

Ĉu vi havas malmultajn eblojn paroli Esperanton?



Pere de la projekto

Ekparolu! de

Edukado.net <https://edukado.net/ekparolu/> vi

povas havi verajn konversaciojn kun spertaj esperantistoj el la tuta mondo por plibonigi vian parolkapablon. Senpage!

La projekto celas:

- helpi al lernantoj parole apliki la lingvon kaj ensociiĝi
- informi ilin pri programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj
- uzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en plua edukado de komencintoj
- fortigi lokajn klubojn kaj Esperantuojn

La programo konsistas el *genevoj* (komencintoj) kaj *geonkloj* (speciale trejnitaj esperantistoj) kiuj renkontiĝas en retaj parolsesioj, ekzemple per *Skype* aŭ *Zoom*. Novaj genevoj estas bonvenaj, kaj la programo ĉiam serĉas novajn geonklojn. Ĝis nun laboras 62 geonkloj kaj 188 genevoj, kiuj kune okazigis pli ol 2100 parolsesiojn!

Ĉu vi volus partopreni? Iru al la **paĝo de Ekparolu!**

<https://edukado.net/ekparolu/> por pli da informo.

Kiaj ŝanĝiĝoj! Kia mondo!

de la prezidento • Filipino DORCAS

Kiam vi legas ĉi tion, ni verŝajne jam spertis nian landan kongreson. Ni, la “samideanoj” de la mondo, spertas novajn defiojn ĉe ĉiu paŝo de la vivo. Pro la mondkaptanta sankrizo, pro la manifestacioj kontraŭ rasa maljusteco, pro la malvastigita vivstilo, kaj pro ekonomiaj premoj, ni sentas nin en nova mondo, certe ekster niaj antaŭaj kutimoj. Ni nun trovas nin enigita en vivsistemojn, kiujn multaj el ni neniam antaŭe spertis.

Tamen, malgraŭ ĉio, Esperanto antaŭeniĝas. Kion ni faras? Kiel vi eble jam rimarkis, ni starigis nian interretan landan kongreson kaj ni tiris supren la temon pri eblaj manieroj per kiuj la samideanoj povos plibonigi nian mondon.

Antaŭ 133 jaroj, en la mondon venis nova sento. Tiu nova sento restas kun ni, nun en ĉi tiu mondo de novaj malvastigitaj vivstiloj kaj sentoj de maljusteco en la socio. La tasko ne plu restas sur la ŝultroj de la pioniroj de Esperanto, sed kun ni, la nunaj gekolegoj.

En niaj kongresoj, en niaj lokaj kluboj, per la diversaj modernaj iloj de la interreto, ni rajtas ... rajtas ... ne, ni havas la taskojn, la defiojn uzi nian karan lingvon por la bono de la mondo.


Pro tio, ke kiam mi verkas ĉi tion, ni ankoraŭ ne spertis nian Landan Kongreson de 2020, mi ne scias kiajn taskojn ni diskutos dum la LK.

1. Ĉu ni jam decidis kion ni povas fari kune rilate al maljusteco en la mondo?
2. Ĉu ni jam decidis kial la 75 jaroj de la Unuiĝintaj Nacioj gravas kaj gravas al la mondo?
3. Ĉu ni jam elpensis kiujn paŝojn el la 17 celoj de daŭripova evoluo ni pritraktas?
4. Ĉu ni jam legis la 30 punktojn de la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj?
5. Ĉu ni jam faris planojn por internacia kunlaboro en projekto en funkciaj rilatoj kun samideanoj en aliaj landoj kaj aliaj kulturoj?

Kion ni decidis fari? Kion ni faros nun?

Esperanto-USA estas bona organizo kun pli forta komunika infrastrukturo. Niaj sistemoj de regionaj kunordigantoj funkcias. Ni elpensas novajn vojojn en la nova mondo. Ni estas pretaj antaŭeniĝi per novaj planoj.

Ek kaj antaŭen.



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidento de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

De la estraro

Ni strebas iri antaŭen

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

Ni havas tiom multe, kion ni devas raporti al vi! Retaj balotiloj haveblas por elekti niajn novajn prezidanto, vicprezidanto, kaj estraranoj! La Landa Kongreso okazos rete!



Raportoj de la kasisto estas haveblaj rete pli ofte por niaj membroj kaj gvidantoj de niaj fondusoj. Niaj novaj kandidatoj jam helpas nin dum niaj monataj estrarkunsidoj. Ni kreas gvidlibron por helpi estontajn aktivulojn. Ni havas usonan junulon, kiu kandidatiĝas por la estraro de TEJO denove. Ni aktivigas je la nacia kaj internacia niveloj. Povas ŝajni, ke la mondo iras malantaŭen, sed ni ĉe Esperanto-USA strebas iri antaŭen!

— Charlotte BURTON, Sekretario

Pri okazigo de virtuala kongreso

Jordon estas Kasisto de E-USA. Oni povas kontakti lin ĉe jordon@kalilich.com.

Kiam multaj el vi legos ĉi tiun rubrikon, Esperanto-USA jam havos sian unuan tute interretan Landan Kongreson. Neniu povus atendi antaŭ ses monatoj, ke tio estos necesa, sed tia ĝi estas.

Kiel vi eble scias, en la maloftaj okazoj kiam Usono aŭ Kanado gastigas la Universalan Kongreson, Esperanto-USA okazigas sian Landan Kongreson kiel serion de programeroj en tiu pli granda evento. Tion ni planis ankaŭ por 2020.



Kiam UEA devis prokrasti UK-on, E-USA estis senkongresa, kio ne eblas. Laŭ nia statuto, ni devas okazigi ĉiujare po unu kongreso, en kiu interalie la voĉdonoj por la estrara balotado estas kalkulitaj.

Malgraŭ tio, ke la planado de fizika landa kongreso daŭras pli ol unu jaron, kelkaj estraranoj kaj volontuloj tuj alfrontis la defion organizi interretan kongreson en kelkaj monatoj. Ili devis reklami ĝin kaj trovi prelegontojn kaj helpontojn, sed ankaŭ demandi al si, “Kia estu tia evento?” Tion ili faras diligente, kun ankoraŭ ne multaj ekzemploj por imiti en aŭ ekster Esperantujo.

Kvankam la planado ankoraŭ ne finiĝis, mi devas danki tiujn, kiuj laboris por realigi ĉi tiun unikan eventon. Filipino DORCAS, Charlotte BURTON, Chuck MAYS, Fred MEYER, Paige FELDMANN, Chloe EVERHART, Alex MILLER, kaj aliaj dediĉis sian tempon kaj energion por certigi, ke Usono havos brilan Esperanto-kongreson en tiu ĉi malluma jaro.

— Jordon KALILICH, Kasisto

Doroteo dancis

leterkesto • Keneĉjo GOLDBERGO

En 2019 forpasis Doroteo HOLLAND, influa, aktiva, kaj tre amata usona esperantisto. Nia leganto Keneĉjo GOLDBERGO sendis omaĝon al ŝi okaze de la 100-a datreveno de ŝia naskiĝo, kiu okazis la 28-an de Majo, 2020.

*Post kiam la laciĝintoj ekdormis,
dum Alberta al oreloj ŝiaj kantis,
Doroteo dancis.*

*Flue, flue, flue,
bele, bele, bele,*

en perfekta harmonio,

en koro mia Doroteo dancas.

Ŝi tion ja meritas!

el la arĥivo

Por akompani la ĉi-numeran omaĝon de Keneĉjo al Doroteo HOLLAND, kiu forpasis pasintjare, jen anonco pri ŝi el 1984.

Dum la ĉi-jara kongreso, ELNA nomis Dorothy HOLLAND Honora Membro de ELNA. Ekde 1946 kiam ŝi lernis Esperanton, s-ino Holland komencis vastan mondkorespondon kaj instruis la internacian lingvon.



En 1948, ŝi estis unu el la fondintoj de la nuna Esperanto-Societo de Chicago. Ŝi verkis radiokurson por Stacio WSEL. En 1955 ŝi ĉeestis kun edzo Roy sian unuan Universalan Kongreson en Bolonjo, Italujo. Post tio ŝi partoprenis kongresojn en Harrogate, Rejkjavik, Lucerno, Braziljo, Budapeŝto kaj Vankuvero. Krom tio ŝi vizitis plumamikojn de

Kanariaj Insuloj ĝis Skandinavio.

Sed eble ŝia plej alte taksata kontribuo al la Esperanto-movado estas kiel instruisto, eĉ per brajla koresponda instruado de Esperanto por *Hadley School for the Blind* (Winnetka, IL), kaj kiel administranto de la Koresponda Kurso de ELNA. Simile, ŝi administras la 3-nivelan nacian ekzamenon. Instruistoj-membroj de AATE (*American Association of Teachers of Esperanto*) konas ŝin pli intime per la paĝoj de ties valorega kvaronjara *Bulteno*.

Skribas Dorothy: “Mi ne povas imagi mian vivon sen Esperanto...”

NOTE: The Santa Barbara *News Press* (8/15) carried an item describing Dorothy Holland’s contribution to the teaching of Esperanto and the fact that she has been named Honorary Member of ELNA.

NASK en pandemia jaro

loke • Lee MILLER

Neniu imagis, en la komenco de 2020, kia estos la sekva periodo, kiaj estos la ŝanĝoj. Neniu.

Pro la apero de la koronaviruso, kaj la pandemia malsano COVID-19, preskaŭ ĉio en la homa vivo rapide ŝanĝiĝis. Kaj la vivo de Esperantujo ne restis netuŝita. (Eĉ en la Akademio de Esperanto estiĝis nova diskutado pri la ĝusta nomo de la nova viruso – ĉu “kronviruso”, “korona viruso”, “koronaviruso” – kaj la nomo por la malsano kaŭzita de la viruso – ĉu KOVID-19, KOVIM-19, ktp.)

En 2019, la usona somera kursaro (NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro, kiel oni plej ofte konas ĝin), festis sian 50-jaran datrevenon. Ekde 1970, dank’ al la laboroj kaj instigoj de Cathy SCHULZE, okazis ĉiusomere en Usono kursaro kun diversaj niveloj de instruado. La somera programo unue okazis en San-Francisko, poste en aliaj urboj, kaj nun okazas en Raleigh, Norda Karolino. Kaj kvankam la celo estas klerigi la esperantistojn de Usono (kaj efektive de Kanado kaj Meksiko), dum la jardekoj multaj homoj el la tuta mondo vojaĝis al Usono por partopreni kaj lerni de konataj kaj eminentaj Esperanto-instruistoj.

2019 estis “ora jaro”. Partoprenis 90 lernantoj, rekorde granda kvanto. Venis kelkaj specialaj gastoj, inkluzive de familianoj de d-ro Zamenhof mem. Plurajn jarojn ni vidis kreskantan intereson kaj pretecon vojaĝi (kaj pagi) por lerni kaj vivi en Esperanto-komunumo plurajn sinsekvajn tagojn.

Kaj jen 2020. La komenco estis bona. Ni rekrutis bonajn instruistojn, kaj planis kursaron pli mallongan ol kutime, pro la konkurenco kun la Universala Kongreso en Montrealo ... Ni reklamis, homoj aliĝis, ni atingis 50 partoprenantojn, kaj subite “FRAP’!”

Ne. Vojaĝi oni ne povos. Ĉeesti kune oni ne povos. Nuligo de la ĉeesta programo en Raleigh. Iom poste nuligo de la Universala Kongreso en Montrealo. Ĉu finfine temis pri la Fino de la Mondo? Ĉu la Zombia Apokalipso?

Sed ni vivas en nekutima epoko, kun nekutimaj kapabloj kaj elektoj. Jam tiel multe pri Esperanto okazas en kaj per Interreto. Ĉu povus esti, ke NASK okazu per Interreto? Perreta instruado jam estas konata afero, kaj rapide multaj lernejoj kaj universitatoj transiris al tiu metodo.

Jen tamen la dilemo: Ĉe NASK, oni ja lernas Esperanton kaj sidas en lecionoj kun bonaj instruistoj 3.5–4.0 horojn ĉiutage. En ordo. Sed la ĉefa “valoro” estas, ke ekster la lecionoj, ekster la muroj de la klasĉambroj, oni konstante interagis kun vivaj esperantistoj! Imagu! En la dormejo, en la manĝejo, sur la tereno de la universitato, en la apudaj drinkejoj (ho, pardonu, trinkejoj ...), eĉ en la banĉambroj kaj ĝardenoj, oni trovas sin meze de esperantistoj ĉie.

Tamen, ĉi-foje la koronaviruso venkis. Ĝi iel decidis, ke tio ne okazos. Glut’. Bedaŭr’. Plor’. Singult’.

Mi, kiel unu el la organizantoj de la tuta afero, estis pesimisma, pesimisto. Mi eĉ rekomendis, frue, ke ni rezignu pri ĉio. Sed aliaj, pli klarvidaj homoj diris “Ne, ne, ni pripensu, ni provu novan aliron.”

Kun tiaj amikoj, kiu bezonas malamikojn?

Efektive, la celo de Cathy Schulze, kiu morale kaj finance subtenis la instruadon de Esperanto en Usono, estis instrui la lingvon. Do, ni paŝon post paŝo komencis esplori a) ĉu la instruistoj estas pretaj instrui interrete? (JES!) ... b) ĉu ni povas krei interretan strukturon por aliĝi kaj pagi ktp? (JES!) ... c) ĉu estas akceptebla kotizo por tia kurso? (JES!) ĉu homoj efektive havos intereson, kaj aliĝos, ktp? Ho mia dio ...

Post la lanĉo de tri-nivela per-interreta kursaro, ni iom post iom gajnis partoprenantojn. Iom post iom, kaj iom post iom ...

Jen 20. Jen 40. Jen 60. Jen 80. Jen “HO VE! NI HAVAS TRO DA HOMOJ!” ... kaj jen “Ni aldonu novan ‘sekcion’ por la Postbaza Kurso” ... kaj iom poste “Ho, jen, ni aldonu duan sekcion por la Meznivela Kurso ... “ Ĝis finfine la kursaro entute havis 156 partoprenantojn. Kaj el tiu 156, multaj estis tute novaj homoj por la NASK-programo

(kompreneblaj aliĝis ankaŭ pluraj kiuj jam lernis en la ĉeesta kursaro antaŭe).

Temis pri instruado per la sistemo “Zoom”, vasta interreta programo kiun oni uzas per elŝutado de aplikaĵo, kaj kiu ebligas vivan, realtempan interagon kun instruisto kaj aliaj partoprenantoj. La sperto ne estas sama, kiel sperto en vera klasĉambro. Sed kune kun minusoj (manko de homa kontakto, perdo de neformalaj interparoloj dum paŭzoj, ktp) estas plusoj (facila alireblo, malpli alta kosto, kaj restado hejme sen la devo vojaĝi kaj loĝi for).

Frenezaj tagoj. Sed tute bonaj. Kiel diris Zamenhof en proverbo, “Eĉ vulpo plej ruza fine estas kaptata”. Hm, ne, ne tiun proverbon mi celis. Momenton. Aha:

“Fino bona, ĉio bona”. Ŝajna katastrofo, kataklisma, fariĝis katalizilo por granda enfluo de novaj partoprenantoj.

NASK estas programo de Esperantic Studies Foundation. La aktuala NASK-teamo konsistas el Ellen EDDY, la Administranto (kiu alprenis tiun ĉi rolon post la morto de Cathy SCHULZE), Anna BENNETT (ESF), Derek ROFF (ESF), Chuck MAYS (Direktoro de ESF), kaj mi. Al miaj kolegoj mi dankas ke, la kapon supren malgraŭ la minaco, la menson klaran malgraŭ la defioj, ni sukcesis ne nur garantii la kontinuecon de la NASK-programo meze de ĥaosa jaro, sed efektive atingis novan klientaron kaj dume malkovris novajn kapablojn kaj metodojn.

Mankato

senintenca esperantaĵo • Brandon SOWERS



Mankato estas urbo en suda Minesoto. Leganto Brandon SOWERS afable atentigis nin pri ĝia senintenca esperanteco.

Bedaŭrinde *mank-ato* ne havas sencon, ĉar la netransitiva *mank/i* ne formas pasivajn participojn. Aktiva *mank-anto* estus tute bona, sed ve, al Mankato mankas kroma *n*. (Brandon supozas, ke Minnesota ŝtelis ĝin.)



Aŭ ĉu temas pri *man-kato*?

La akcento estu sur la lasta silabo!

lingvaj rajtoj • Norman BERDICHEVSKY



La kataluna lingvokomunumo loĝas en diversaj teritorioj. Katalunujo mem estas nur unu el tiuj teritorioj, kaj ĝi delonge estas dividita en nordan kaj sudan parton per la landlimo inter Francujo kaj Hispanujo.

Imagu, ke vi spektas lerte produktitan kulturfilmon pri la individueco de Usono. Cetere imagu, ke la eminentaj gvidantoj en tiu filmo misprononcas la nomojn de gravaj kaj mondfamaj historiaj figuroj, akcentante malĝuste, ekzemple *Wa-SHING-ton*, *Jef-FER-son*, *Ken-NE-dy*, ktp.

Io simila okazis en *An Art Lovers' Guide: Barcelona*, kulturfilmo de BBC, produktita en 2015 kaj reaperigita en Majo ĉi-jare. Ĝi traktis la individuecon kaj kulturen fiecon de la katalunoj en la nordorienta regiono de Hispanujo. La gvidantoj informas nin pri GAŬ-di, DA-li, kaj MI-ro, ŝajne ne konsciaj, ke la ĝusta akcento en tiuj tipaj katalunaj nomoj estu sur la lasta silabo (*Gaudí*, *Dalí* kaj *Miró*; ĉio literumita kun la akcenta supersigno ĉe la lasta vokalo), elementa fakto, kiujn la gvidantoj ŝajne ne konis, aŭ simple konsideris negrava.

La filmo prezentas dek du konversaciojn kun lokaj aŭtoritatoj en Barcelono, kiuj esprimas respekton por Gaudí, Dalí kaj Miró. Plurfoje la kamerao eĉ montras stratŝildojn, kie ĉiu nomo aperas kun supersigno ĉe la LASTA silabo. Ĉu io misas aŭ mankas pri la vid- aŭ aŭd-kapablo de la gvidantoj? Jes, sed nur en senco

kultura, ne fizika. Kaj pli verŝajne, temas pri konscia decido uzi ion konatan al la spektantaro, kiun konsistigas ĉefe denaskaj angla-lingvanoj en Britujo.

Eĉ pli ironia estas la uzo de la hispana lingvo (kastilia) anstataŭ la kataluna, fare de intervjuitoj responde al demandoj en la angla. La sola kialo devas esti la malvolemo de la BBC-produktantoj serĉi tradukistojn kaj interpretistojn spertajn pri ambaŭ la kataluna kaj la angla, kiuj multe malpli oftas ol tiuj spertaj pri la kastilia kaj la angla.

La du gastigantoj de la programo pasigas horon klarigante detale la diversmanieran individuecon de Katalunujo relative al Kastilio kaj la resto de Hispanujo. Se, laŭdante la distingon de la regiono, ili do elektas ignori la ĝustan elparolon de katalunaj nomoj, tio montras subestimon.

Estas vere, ke ĉiuj katalunaj plenkreskuloj scipovas ambaŭ lingvojn, sed tio ne ŝanĝas la realon de la jarcentojn longaj rivalecoj, sintenoj lernitaj en frua infanaĝo, distingaj vidpunktoj transdonitaj de la politika elito en Madrido, kiuj regis aferojn dum jarcentoj, intensigante la senton de la katalunoj pri sia kerna identeco.

La verkoj en arkitekturo kaj pentrarto de Antoni GAUDÍ (1852-1926), Salvador DALÍ (1904-1989), kaj Joan (ne Johano) MIRÓ (1893-1983) ampleksas jarcenton kaj diversajn stilojn de *Art Nouveau*, Superrealismo kaj *Art Deco*. Ili hodiaŭ estas konataj kiel geniuloj, kvankam en la komenco oni rigardis ilin kun suspekto kaj scivolemo, kaj eĉ denunciis ilin. Ĉiujn tri profunde kompromitis forta sento de kataluna nacia identeco, kaj la nacia movado por aŭtonomio kuraĝigis ilin kiel grandajn artistojn, kies laboro vere spegulis ĉion, kio distingis katalunan kulturon, novigemon, iniciatemon, aŭdacon kaj fiecon.

Ekstrem-konservativuloj, kiuj malfidis katalunan komercan lertecon eĉ nomis subtenon por la Respubliko dum la Enlanda Milito (1936-39) parto de “jud-kataluna konspiro.” Simile, mirigis min, ke kelkaj katalunaj intelektuloj kaj “aktivuloj” en la movado por pli granda aŭtonomio kaj eĉ

sendependeco rigardis la plimulton de ordinaraĵoj hispanoj kiel malkleruloj, al kiuj mankas kulturo.

Ĉefartikolo de verkisto Salvador SOSTRES aperis en la “bone estimata” kataluna lingvo-gazeto *Avui* la 17-an de Julio 2006. Ĝi citis la prosperon kaj vivecon de Katalunujo kaj la lingvon de ok milionoj da homoj vivantaj sur socia, ekonomia kaj eduka nivelo egala al Danujo kaj Norvegujo, male al la 400 milionoj da mondaj parolantoj de la hispana, kaj iliaj tre malaltaj ekonomiaj kaj sociaj mezuroj pri bonstato ...

Sostres skribis: “En Barcelono, la hispana estas la lingvo de ĉambriistoj kaj aliaj dungitoj. Ĝi estas la lingvo de stultuloj, analfabetoj, kaj homoj tiel malaltaj, ke ili parolas lingvon, kiu faras tiun timandan ‘gutan bruon.’ Tiuj, kiuj ne parolas la katalunan ankaŭ ne scias la anglan, aŭ la francan, kiel ni ... Sed ne nur en Katalunujo, la hispana estas simptomo de la malsupera klaso ... Estas vere, ke paĝoj estis bonege verkitaĵoj en la hispana, sed la fortuna de la landoj, kiuj parolas ĝin, historie estis nerevokebla katastrofo ... La aparteco de Katalunujo estas tute pravigita eĉ se nur por fuĝi de la rumo kaj la polvo, la malĝojo de esti hispana”.

Estas dubinde, ĉu la redaktoro de iu grava usona aŭ brita ĵurnalo permesus tian malestimon lingvaĵon kontraŭ iu etna, rasa aŭ religia grupo, sed ĝi reflektas multajn sintenojn ankoraŭ libere esprimitajn.

La internacia, elpensita lingvo Esperanto estas pli simila al la kataluna ol iu ajn nacia lingvo, kaj tiu simileco estis uzata kiel ekrano fare de katalunaj naciistoj dum la frua periodo de la regado de generalo Franco, kiam la kataluna estis subpremita kaj praktike ekskludita de iu publika manifestacio aŭ kultura ekspozicio.

Estas ne nur BBC, sed ĉiuj grandaj firmaoj kun

tutmondaj interesoj, kiuj serĉas “simplan” solvon de la plej granda merkato, kiel la firmao Walt Disney faris en 1995, kiam ĝi rifuzis doni dublitan version en la kataluna de sia nova filmo *Pocohontas*. Ĝi asertis, ke ĝi perdos monon, kvankam la EU promesis financi ĝin. Finfine, dublita hispana (kastilia) versio jam ekzistis por servi la grandan internacian “hispanparolantan mondon” de 400 milionoj parolantoj kontraŭ la sep milionoj da katalunaparolantoj. (Dublado de filmo kostas dekoble pli ol subtitolado). Unu jaron poste, post bojkotoj kaj manifestacioj, la decido estis inversigita – kaj por *Pocohontas*, kaj por la nova Disney-filmo en 1996, *The Hunchback of Notre Dame*.

La katalunoj ekzorcis la fantomon de generalo Franco, lian 35-jaran regadon kaj provon senigi la katalunojn de ilia kultura identeco. Ili estas profunde dividitaj pri la demando pri sendependeco kaj restarigo de la Respubliko. Plej multaj estas ne simpatiaj al la monarkio, kiu tiel longe identiĝis kun la hispana imperiismo kaj centrista regado de Madrido. Ili tamen unuanime fieras kaj kompromisas kun la politikoj, kiuj antaŭenigas la unuarangecon de la kataluna lingvo. Plie, ili malakceptas la specon de monda kapitalismo, kiu celas regi malgrandan popolon, kaj malpliigi la esencon de ĝia lingvo kaj kulturo.



Norman BERDICHEVSKY

Norman estas veterana esperantisto kiu aktivadis en Usono, Israelo, Hispanujo, kaj Danujo. Post multaj jaroj en Florido instruante ĉe UCF, li nun loĝas en Britujo por esti pli proksima al siaj filoj kaj nepoj.

normberd@gmail.com

Kion fari pri propraj nomoj?

traduku! • HOSS FIROOZANIA, Lee MILLER

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. Leginte viajn respondojn, ni faros resumon de la diversaj provoj, kune kun reagoj, komentoj, kaj proponoj.

Tradukante tekston el fremda lingvo en Esperanton, kion ni faru pri propraj nomoj? Ĉu ni “esperantigu” ilin por internacia legantaro, aŭ ĉu ni konservu ilin senŝanĝe? En nia defio el *Mary Poppins* (Nº 2020:1) aperas la roluloj *Jane, Michael*, kaj kompreneble *Mary Poppins* mem. Neniuj el tiuj nomoj bone konformas al la skribsistemo de Esperanto, do neanglalingvaj legantoj eble ne scios, kiel prononci ilin.

Jam ekzistas konataj esperantigoj por la personaj nomoj en la teksto: *Johana* (aŭ eble *Jana*), *Miĥaelo*, kaj *Maria*. Sed kio pri *Poppins*? Eble ne sufiĉas simple kapti la sonojn (ekz. *Popinz*), ĉar supozeble la nomo estas ankaŭ vortludo: la rolulo abrupte *pops in* (ekaperas).

Kiel tradukistoj jam traktis la nomojn en aliaj lingvoj? En la okcidenteŭropaj lingvoj, ŝajnas ke la nomo *Mary Poppins* restas senŝanĝa. Sed en la korea ŝi nomiĝas 메리 포핀스 [meli popinseu]; en la mandarena, 瑪麗·包萍 [Mǎlì·bāo píng].

Vidante tiajn “ŝanĝojn” en amata klasikaĵo, anglalingvanoj foje sentas siajn harojn hirtiĝi. Ekzemple, kiam William AULD esperantigis la nomojn de *Ŝerloko Holms* kaj *d-ro Watson* en *La ĉashundo de la Baskerviloj* (2008), iuj plendis. “Aĥ, kiel ĝene!” ili grumblis. “La nomo estas *Sherlock*, ne *Ŝerloko*! Kial la tradukisto ne respektis la originalan tekston?”

Estas tre facile opinii tiel, kiam oni jam konas la originalan verkon. Sed Esperanto estas lingvo por internacia legantaro, kaj tradukanto devus respekti ankaŭ tiun legantaron, ĉu ne? Jen la respondo, kiun Auld donis en sia antaŭparolo:

Mi neniel pardonpetas pro mia esperantigo de propraj nomoj en tiu ĉi traduko. Min ĉiam ĝenas fremdlingvaj nomoj, ofte por mi neprononceblaj, meze de Esperanta teksto, ĉar ili ĉiam heziligas la rapidan fluon de mia legado. Ne nur tio, sed la fremdlingvaj nomoj ne akceptas nature

adjektivigon aŭ adverbigon, kaj – plej grave – akuzativigon. Ne ekzistas regulo, kiu tekstas: *La akuzativo estas deviga, krom en la kazo de propraj nomoj*; aŭ: *objekto ne ekzistas, kiam temas pri propraj nomoj*. Agi tiel estas subtila subfoso de nia lingvo, kaj vidigas mankon de fido pri ĝi entute. Alilandula fuŝprononco de anglaj propraj nomoj nur konfirmas por mi mian sintenon.

En la kazo de Dr Watson (tiel), la nomo mem jam ŝajnas havi akuzativan finaĵon, kio estas maloportuna (ĉu Dr Watson’on – ba!), do mi uzas: doktoro Watsono. Vivanta homo eble havas rajton al sia nomo, sed tio ne nepre validas kaze de fikcia kreaĵo. Ni devas liberigi nin de imponiĝo antaŭ la nomaj ideogramoj, kaj restarigi la fluantecon de nia ŝatata lingvo!”

Nia defio el *Mary Poppins* vekis la intereson de tri kuraĝaj legantoj, kiuj ĉiuj bone laboris: BA, RH, kaj JN. Dankon al ili! Neniuj elektis esperantigi la proprajn nomojn, do en nia sinteza teksto ni lasas ilin senŝanĝaj.

Jen kelkaj esprimoj, pri kiuj oni proponis malsamajn solvojn, kune kun niaj komentoj:

As it did not seem — Plej taŭgas la propono de JN, *Ĉar ne ŝajnis*. Por doni iomete pli “formalan” senton al la frazo, ni eble eĉ dirus *Pro tio, ke ŝajnis ...*

though she sniffed a great deal — Oni proponis *multe snufis, enflaris multe*, kaj *multe snufadis*. Eble pli taŭgas *snufetis*, ĉar *snufi* estas forta, brua ago, kaj la ideo en la teksto estas ŝajne pli delikata.

could not restrain himself — *ne povis reteni sin, ne plu povis deteni sin*. Ambaŭ bonaj, sed ni preferas la proponon de RH, *ne povis briditi sin*.

“What a funny bag!” — La propono *drola sako* (RH) estas interesa. Tamen la sako ŝajne ne estas komika, sed nur nekutima. *Kurioza* (BA, JN) kaptas la ideon, sed ĉu tio estas la ĝusta lingvotavolo por infano? Michael povintus nomi la sakon *curious* en la originala teksto, sed li elektis *funny*. Do eble pli taŭgas *stranga, neordinara*, aŭ *nekutima*.

“Carpet,” said Mary Poppins — Du proponis **“Tapiŝo”**. Sed eble en ĉi tiu kunteksto pli taŭgas **“Tapiŝa”** (BA).

To carry carpets in, you mean? — La esprimo *you mean?* estas supozeble mallongigo de *“is that what you mean(t) to say?”* aŭ simile, do oni prave proponis *vi volas/intencis/celas diri*. Sed la anglalingva esprimo estas tiel mallonga, ke en praktiko ĝi funkcias kiel ĉu. Do eble ni simple dirus, *Ĉu, do, por porti tapiŝojn?*

No. Made of. — La propono de JN estas bona redono: *Ne. El.*

But he didn’t—quite. — Ĉiuj tradukis per *tute*, sed ĉu eble tro laŭvorte? Kio pri: *Sed li ne komprenis, efektive?*

Jane and Michael were more than surprised — multe surpriziĝis, kun granda surprizo. Plej plaĉas al ni *miregis* (RH).

“Why”, said Jane, there’s nothing in it! — Du proponis **“Ho,”** diris Jane. Laŭ ni, la ĝusta senco ĉi tie estas **“Sed, ...”** (JN).

and looking as though she had been insulted — Du proponoj uzis *kvazaŭ oni*, sed eble pli bona elekto estus *kun mieno de iu, kiun oni mallaŭdis*.

And with that — *dirinte tion, tion dirinte, kaj post tio*. Eblas ankaŭ la simpla *tiam*.

Next she unpacked a large cake of Sunlight Soap — Plaĉas al ni *elpakis* (RH), *elprenis* (BA).

a box of throat lozenges — Du elektis *tablojdoj*, sed ĉar *tablojdo* estas ĝenerala termino por medikamento, kiun oni lasas fandiĝi en la buŝo, necesis aldoni priskribojn: *suĉtablojdoj kontraŭ gorĝdoloro, gorĝaj tavoloj*. RH proponis *lozanĝoj*, ankaŭ bona. Ni dirus *kontraŭtusaj lozanĝoj*.

Jane and Michael stared. — *fiksrigardis, rigardegis, rigardis ŝtoniĝinte*. Ni eble dirus simple *gapis*.

Hush! — *Ĉit!* (RH) estas tre bona propono.

He wrinkled up his nose. — JN donis eble la plej trafan proponon, *Li sulketis la nazon*. Ni tamen

scivolos, ĉu la ideo de **“sulketiĝinta nazo”** estas internacie konata.

En la **Tekstaro de Esperanto**

<<https://tekstaro.com>> ni trovas multajn sulkiĝintajn brovojn, fruntojn, vizaĝojn, kaj eĉ okulojn ... sed neniujn nazojn. Supozeble la priskribita mieno estas internacie konata, sed malsamaj kulturoj konceptas ĝin malsame. En la itala, ekzemple, temas pri nazo *tordita*.

Ĉu taŭgas *grimacetas* aŭ *sulketis la frunton?* Eble tro ĝeneralaj: sulkiĝinta frunto esprimas vastan gamon da emocioj, ekz. frustriĝon, ĉagrenon, aŭ doloron, sed la *wrinkled up nose* de Michael esprimas ion multe pli specifan.

Oni povus klarigi la mienon sen priskribi ĝin, ekz. *li mienis malŝate*. Simile, oni povus diri *katbleki* kaj *ĉevalbleki* anstataŭ *miaŭi* kaj *heni* ... sed perdiĝas la gusto, ĉu ne?

En la libro *Kiel diri? Praktika esperanta frazeologio* (1983) Lentaigne proponas la esprimon *kuntiri la nazon*. Ĉu pli internacie konata ol *sulket(ig)?* Eble, sed ni iom dubas ...

Michael suddenly discovered — Plej trafa inter la proponoj estas *subite konstatis* (BA). Ankaŭ *subite ekkonsciis* eble taŭgus.

Jen la traduko sinteza:

Ĉar ne ŝajnis, ke Mary Poppins diros ion plu – kvankam ŝi multe snufetis – ankaŭ Jane restis silenta. Sed kiam ŝi kliniĝis por malfermi sian sakon, Michael ne povis bridi sin.

“Kia stranga sako!” li diris, pinĉante ĝin per la fingroj.

“Tapiŝa”, diris Mary Poppins, metante ŝlosilon en la seruron.

“Ĉu, do, por porti tapiŝojn?”

“Ne. El.”

“Ho”, diris Michael. “Mi komprenas”. Sed li ne komprenis, efektive.

Tiam la sako jam estis malfermita, kaj Jane kaj Michael miregis trovi ĝin tute malplena.

“Sed”, diris Jane, “estas nenio ene!”

“Kion vi celas per ‘nenio?’”, demandis Mary Poppins, rektiĝante kun mieno de iu, kiun oni insultis. “‘Nenio ene’, vi diras?”

Kaj tiam el la malplena sako ŝi prenis blankan, amelitan antaŭtukon, ligante ĝin ĉirkaŭ la talion. Poste ŝi elprenis grandan sapobrikon, dentrobrosan, paketon da harpingloj, parfumbotelon, etan faldeblan brakseĝon kaj skatolon da kontraŭtusaj lozanĝoj.

Jane kaj Michael gapis.

“Sed mi *vidis*”, flustris Michael. “Ĝi *estis* malplena.”

“Ĉit!” diris Jane, dum Mary Poppins elprenis grandan botelon kun etikedo: “Unu kuleron antaŭ enlitiĝo”.

Kulero estis fiksita ĉe la kolo de la botelo, kaj en tiun Mary Poppins verŝis malhelan, karmezinan likvon.

“Ĉu tio estas via medikamento?” demandis Michael kun granda intereso.

“Ne, la via”, diris Mary Poppins, prezentante la kuleron al li. Michael rigardis ĝin. Li kuntiris la nazon. Li komencis protesti.

“Mi ne volas ĝin. Mi ne bezonas ĝin. Mi rifuzas!”

Sed la okuloj de Mary Poppins fikse rigardis lin, kaj Michael subite konstatis, ke oni ne povas rigardi al Mary Poppins kaj malobei ŝin.



La nova defio

Denove temas pri fontoteksto anglalingva; via tasko estas traduki ĝin en Esperanton. (En paraj numeroj de la bulteno aperas tekstoj en Esperanto; en neparaj, tekstoj en la angla.) Memoru: **ne necesas traduki la tuton**; ni kuraĝigas vin ataki ĉion, kompreneble,

sed ni ĝoje akceptos ankaŭ fragmentojn. Do ne hezitu provi!

La teksto venas el la furora sciencfikcia romano *Little Brother* de Cory DOCTOROW, kiu eldoniĝis en 2008:

I’m a senior at Cesar Chavez high in San Francisco’s sunny Mission district, and that makes me one of the most surveilled people in the world. My name is Marcus Yallow, but back when this story starts, I was going by w1n5t0n. Pronounced “Winston.”

Not pronounced “Double-you-one-enn-five-tee-zero-enn”—unless you’re a clueless disciplinary officer who’s far enough behind the curve that you still call the Internet “the information superhighway.”

I know just such a clueless person, and his name is Fred Benson, one of three vice-principals at Cesar Chavez. He’s a sucking chest wound of a human being. But if you’re going to have a jailer, better a clueless one than one who’s really on the ball.

“Marcus Yallow,” he said over the PA one Friday morning. The PA isn’t very good to begin with, and when you combine that with Benson’s habitual mumble, you get something that sounds more like someone struggling to digest a bad burrito than a school announcement. But human beings are good at picking their names out of audio confusion—it’s a survival trait.

I grabbed my bag and folded my laptop three-quarters shut—I didn’t want to blow my downloads—and got ready for the inevitable.

“Report to the administration office immediately.”

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 15-a de Novembro**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ volas; ni akceptos fragmentojn. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu** tradukon, ne plurajn diversajn provojn.

La vivo de Peĉjo

Ĝercoj • Timothy BORONCZYK



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de “Awesome Satyr”. (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer’s name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.